27 MAJO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ TRIA JARO. — N° 8

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ADMINISTRATION
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Suisse)

Abonnement annuel . . . . . 3 francs
Un numéro . . . . . 10 cent.
On s'abonne à l'Administration ou auprès des agents locaux

PUBLISHING OFFICE
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Geneva (Switzerland)

Yearly subscription . . . . . 2s. 6p.
Separate copies 4d
Subscriptions payable to the Publishers or the Local Agents

ADMINISTRATION
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genf (Schweiz)

Preis pro Jahr . . . . . M° 2.50
Einzelne Nummern . . . . . M° 0.10
Abonnements Preise sind zu beziehen durch die Administration oder die Abgeordneten derselben

L'Esperanto et le mouvement des idées

(II)

L'Esperanto est appelé à rendre de très nombreux services dans les milieux ouvriers, soit politiques, soit purement professionnels. Plus que tout autre, l'ouvrier de modeste condition est, par suite du manque de temps et d'argent le plus souvent empêché d'apprendre les langues étrangères, ne fut-ce que superficiellement, et cependant ses intérêts professionnels le mettent très souvent dans l'obligation d'entrer en rapport avec ses collègues d'autres pays. Grâce à sa simplicité, l'Esperanto peut être appris en quelques semaines par des personnes ne connaissant que leur langue maternelle; l'expérience en a été faite et a livré partout d'excellents résultats. Au bout de très peu de temps, les élèves ouvriers d'un cours d'Esperanto étaient capables d'entrer en correspondance suivie et fructueuse avec d'autres ouvriers esperantistes appartenant aux pays les plus divers.

Le mouvement esperantiste ouvrier n'en est encore qu'à ses débuts; cependant des résultats appréciables ont été obtenus. Le Congrès des ouvriers platriers-peintres a décidé de se servir de l'Esperanto dès le proclain congrès. Un certain nombre de cours ont été donnés dans les syndicats ouvriers, dans de nombreuses villes.

D'autres parts, des groupes socialistes et libertaires ont été fondés en Suisse, en France, en Belgique, en Suède, en Angleterre, aux Etats-Unis, dans l'Uruguay, etc. Durant le Congrès esperantiste de Genève, les Rouges (Ruĝulo) ont tenu une séance et se proposent de profiter du Congrès de Cambridge pour se réunir à nouveau. Depuis le mois de janvier, paraît à Paris une grande revue internationale, sous le nom de *Internacia Socia Revuo*[1]. Cette revue, fort bien rédigée, paraît entièrement en Esperanto, et contient des articles sur le mouvement ouvrier dans les différents pays, écrits par les représentants même des pays auxquels il est fait allusion. En outre, une bibliothèque, contenant les traductions en Esperanto des œuvres les plus connues du mouvement ouvrier, est actuellement en voie de formation; divers ouvrages ont déjà été traduits. Le Congrès socialiste français a voté en 1905 une résolution en faveur de l'Esperanto.

Ainsi qu'on peut le voir par ce très bref résumé, l'Esperanto est susceptible de rendre dès maintenant de nombreux services à tous ceux qui travaillent à la diffusion d'une idée. Il va de soi que les divers groupements que nous avons signalés sont absolument distincts du mouvement esperantiste lui-même, complètement neutre, mais ils fournissent, sur une échelle encore restreinte, un exemple caractéristique de l'influence considérable qu'aura sur le mouvement des idées la généralisation de la langue auxiliaire.

Esperanto-Journal.

(1) Internacia Socia Revuo, 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

Das Esperanto und die Ideenbewegung

(II)

Das Esperanto bei den Arbeitern. — Das Esperanto ist dazu berufen, den politischen und rein beruflichen Arbeitervereinigungen schätzbare Dienste zu leisten. Mehr als jeder andere ist der Arbeiter in bescheidenen Verhältnissen infolge von Geld- und Zeitmangel sehr oft verhindert fremde Sprachen zu erlernen, wenn es auch nur ganz oberflächlich wäre, und doch wird manchmal in seinem persönlichen Interesse genötigt sich mit Kollegen anderer Länder in Verbindung zu setzen. Dank seiner Einfachkeit können Leute, die ausser ihrer Muttersprache keine andere Sprache kennen, das Esperanto in wenigen Woehen vollständig erlernen; die Erfahrung ist gemacht worden und hat erfreuliche Resultate zu Tage gefördert. Nach sehr kurzer Zeit, waren mehrere an einem Esperantokurse teilnehmende Arbeiter imstande, mit esperantistischen Arbeitern der verschiedensten Länder in eine fruchtbringende Korrespondenz zu treten.

Trotzdem die Esperantobewegung bei den Arbeitern erst beginnen hat, sind die Ergebnisse doch schon sehr schätzenswert. Der Kongress der Gipser und Flachmaler hat beschlossen am nächsten Kongress sich des Esperanto zu bedienen. Eine Anzahl von Esperantokursen sind in den Arbeitersyndikaten verschiedener Städte eingerichtet worden.

Ferner sind in der Schweiz, Belgien, Schweden, England, den Vereinigten Staaten, Urugay etc. Sozialisten und Freiheitlergruppen ins Leben gerufen worden. Während des Kongresses in Genf haben die „Roten" (Ruĝulo) eine Sitzung abgehalten und beschlossen sich am Kongress in Cambridge wiederum zu versammeln. Seit Januar erscheint in Paris eine grosse internationale Zeitschrift unter dem Namen „Internacia Socia Revuo"[1]. Diese sehr gut geleitete Zeitung wird ganz in Esperanto herausgegeben und bringt Aufsätze über die Arbeiterbewegung in den verschiedensten Ländern, die von Vertretern dieser Länder, selbst verfasst sind. Unter anderm ist gegenwärtig eine Bibliothek, die Esperantoübersetzungen der bedeutendsten Werke über die Arbeiterbewegung enthalten soll, im Entstehen begriffen; verschiedene Werke sind bereits übersetzt. Der französische Sozialistenkongress hat eine Resolution zu Gunsten des Esperanto gefasst.

Wie aus dieser kleinen Uebersicht zu ersehen ist, kann das Esperanto schon jetzt denjenigen, die an der Forderung einer Idee mitwirken, zahlreiche Dienste leisten. Es ist selbstverständlich, dass verschiedene oben erwähnte Gruppen mit der Esperantobewegung selbst ganz und gar nichts zu tun haben, aber sie bieten, allerdings noch in beschränkten Masse, einen charakteristisches Beispiel des beträchtlichen Einflusses, den die Verallgemeinerung der Hilfssprache auf die Ideenbewegung ausübt.

Esperanto-Journal.

(1) Int Socia Revuo, 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

Esperanto and the Evolution of Thought

(II)

Esperanto is called upon to perform numerous services whether political or purely professional to the working man. More than any one perhaps, the workman is prevented by want of time and money from learning even superficially foreign tongues, and yet his particular interests often compel him ti communicate with his colleagues in other lands. Thanks to its simplicity, Esperanto can be learnt in a few weeks by those who only know their mother tongue; this experiment has been made and given excellent results everywhere. After a very short time workmen learning Esperanto have shown their ability to correspond to their advantage with other Esperantist workmen of various countries.

This movement is only in its infancy but the results already obtained are by us means to be neglected. The plasterers and painters have decided to use Esperanto at their next congress. Working men's syndicates have given series of lessons in many towns.

Moreover, socialist and independent groups have been founded in Switzerland, France, Belgium, Sweden, England, the United States, Uruguay etc... At the Esperanto Congress in Geneva, the Reds (Ruĝulo) held a meeting and propose profiting by the Cambridge Congress to hold a second. Since January an international review, the "Internacia Socia Revuo"[1] is published in Paris. This review, admirably edited is published entirely in Esperanto, and contains articles concerning the doings of the workman in many lands, written by working men inhabiting those lands. Besides this, a library containing translations in Esperanto of the best known works on this subject is now being formed. The French Socialist Congress has passed a vote in 1905 in favour of Esperanto.

***

This brief account clearly shows how useful Esperanto already may be to those who are striving to forward any special idea. It is evident that such groups as the above are absolutely distinct from the Esperanto movement itself, which remains neuter, but they give us an example of what a great influence the auxiliary tongue may have on the propogation of an idea.

Esperanto-Journal.

(1) Internacia Socia Revuo, 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

El Esperanto y elmovimiento de ideas

(II)

Movimiento esperantista obrero. El Esperanto está llamado ha hacer numerosos servicios en los medios artesanos, sea politicos, sea puramente profesionales. Ante todo el trabajador de modesta condición está, por causa de falta de tiempo y plata, mayormente impedido de aprender las lenguas estranjeras, fuese sino superficialmente y sin embargo sus interéses profesiónales le obligan muchas veces de entrar en correspondencia con sus colegas de otros paises. Gracias á su sencillez, el Esperanto puede ser aprendido en algunas semanas por personas que no conocen sino su lengua maternal, el experimento ha sido hecho y ha dado en todas partes excelentes resultados. En poco tiempo los discípulos trabajadores de un curso de Esperanto eran capaz de entrar en correspondencia seguida y fructuosa con otros trabajadores esperantistas pertenecientes á los paises mas diversos.

El movimiento esperantista obrero está tan solo en principios sin embargo resultados favorables hano sido obtenidos. El congreso de trabajadores yeseros pintores ha resulto servirse del Esperanto en el proximo congreso. Un cierto número de cursos fueron dados en los sindicatos obreros, de muchas ciudades. De otras partes, grupos socialistas y liberales fueron fundados en Suiza, Francia, Bélgica, Suecia, Inglaterra, Estados Unidos, Uruguay, etc. Durante al congreso esperantista de Ginebra, los Rojos (Ruĝulo) han tenido una sesion, proponiendose de aprovechar del congreso de Cambridge para reunirse de nuevo. Desde el mes de Enero pareca en Paris una gran revista internacional, bajo el nombre «Internacia Socia Revuo». Esta revista muy bien redactada, parece enteramente en Esperanto, y contiene articulos sobre el movimiento artésano en los diferentes paises, escrifos par los representantes mismos de los paises á quienes se hace alusión. Ademas, una biblioteca conteniendo traducciones en Esperanto de obras las más conocidas del movimiento obrero está actualmente en via de formarse, varias obras fueron ya traduidas. El congreso socialista francés ha votado en 1905 una resolución en favor del Esperanto.

Por lo visto par este muy corto resumido, el Esperanto está susceptible ha dar desde ahora numerosos servicios á todos los que trabajan á la difusión de una idea. Se ve que los diferentes grupos que hemos señalado, son completamente distinctos del movimiento esperantista mismo, completamente neutro, pero proveen sobre eina escala todavía reducida un ejemple caracteristico de la considerable influencia que tendra sobre el movimiento de ideas la generalización de la lengua auxiliar.

Esperanto-Journal.

(1) Internacia Socia Revuo, 45 Rue de Saintonge, Paris-3e.

27 MAJO 1907. Unu Numero : 10 CENTIMOJ TRIAJARO. — N° 8

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO
Unu Jaro . . . . . 3 fr. 2 1/2 m. 2 1/2 s.
Helpabono. . . . . 10 fr. 8 m. 8 s.
Oni abonas ce la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO :
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)
Bulgara Eldono : N. G. Kovaĉef, Sofio

REKLAMO
1 paĝo. . . . Fr. 240 — 1/2 kolono . . . Fr. 16 —
1 kolono . . . » 60 — 1/4 » . . . » 9 —
1/8 » . . . » 30 — 1/16 » . . . » 5 —
25 % por 12 anoncoj ; 50 % por 24 anoncoj
Ĝeneralaj Agentoj : G. Wahnier, 46, Rue Sainte-Anne, Paris-2e
C. A. L. Browne, 53, Wych Street, London W. C.

LA INTERNACIA HELPA MONO

Ni pli kaj pli klare konstatas, ke la fundamenta principo, sur kiu staras la ideo pri internacia helplingvo estas fruktodona principo, kiu permesos solvi ne nur la demandon pri diverslingveco, sed ankaŭ multajn aliajn demandojn de internacia intereso. Tiuj demandoj kompreneble estas ligitaj al la afero pri internacia lingvo kaj sekve devas esti solvataj laŭ simila metodo. Inter tiuj temoj, troviĝas ĉe la unua vico la demando pri *mona unuo*, ĉar la diverseco de la naciaj monoj elikas la samajn malfacilaĵojn kiel la diverseco de la naciaj idiomoj. La ideo pri internacia mono uzebla en ĉiuj landoj sendube estas ne nova, sed ĝis nun tiu ideo ne povis esti realigita, ĉar la demando estis ne bone kompreniĝa. Por solvi ĝin, oni proponis, aŭ ke ĉiuj nacioj akceptu ian nacian monunuon (ekz. la franko), aŭ ke la registaroj interkonsentu por elekti novan unuon kaj trudi ĝin sinsekve al ĉiuj landoj de l'mondo, forigante la naciajn kutimojn. Tiamaniere oni agis por enkonduki la metran sistemon de la pezoj kaj mezuroj, kaj pro tio, la universaligo de tiu sistemo renkontas tiom da malhelpoj; antaŭ ne longe, la Brita Parlamento denove rifuzis proponon pri ĝia enkonduko en Britujo.

En la realeco, la demando estas pli simpla ol ĝi ŝajnas, ĉar ĉia sistemo internacia celas ne forigi la naciajn sistemojn, sed ilin interligi; estas do ne necese, ke la diversaj popoloj forlasu siajn monunuon; ankaŭ estas ne necese presigi monon internacian. Kontraŭe, tiu mono estas principe *kalkulmono*, t. e. mono, kiu rilatas al la naciaj monoj same kiel Esperanto al la naciaj idiomoj. Tiamaniere, la Anglojo ekzemple, povos kaj konservi siajn medecinalajn sistemon de livroj, ŝilingoj kaj penoj, sed ĉiufoje kiam ili ekrilatos kun fremduloj, la kalkulo estus faratay per la internacia monunuo. Konsiderinte laŭ tiu vidpunkto, la diversaj internaciaj sistemoj (pezoj, mezuroj, monoj), estas nur simpliaj lingvaj difinoj; efektive, kiam oni skribas aŭ parolas Esperante, oni ne havas pli specialan pravigon por esprimi la prezon per frankoj ol per dolaroj aŭ ŝilingoj, ĉar Esperanto estas internacia lingvo; oni do laŭlogike bezonas nur enkonduki en tiun lingvon novan vorton por signiĝi precizan monvaloron, kiu estas la monunuo internacia.

***

Por fiksi tiun internacian monunuon, ni nur bezonas doni al ĝi nomon kaj difini ĝian precizan valoron per pezo de pura oro. En artikolo aperinta en Maja N° de *Internacia Scienca Revuo* (1) mi proponis la jenan metodon :

Taŭgas unue rilatigi la novan monunuon kun la metra sistemo, t. e. elekti tiun unuon tiamaniere ke ĝia responda oprezo estu esprimebla per entjera nombro da gramoj. La pej gravaj oraj naciaj monunuoj (liv. st. 20 markoj, 5 dolaroj) pezas proksimume 8 gramojn, laŭ ora proporcio 0,900 (t. e. 9/10) ĝis 0,916 2/3, (t. e. 11/12) kaj ilia valoro estas proksima al 25 frankoj. Sekve, la plej bone estos, se oni elektus kiel monunuon la valoron de ora monero pezanta precize 8 gramojn, laŭ proporcio 11/12. Sed anstataŭ kalkuli laŭ ora monunuo da 8 gramoj, ni povas kalkuli laŭ unuo dekone, centone, milone pli malgranda ĝar estas pli oportune uzi tre malgrandan monunuon, por esprimebligi la valoron de la diversaj naciaj monoj per entjeraj nombroj da internaciaj unuoj. Tian unueton ni nomos *speso*; ĝi estos la dekmilono de la supre difinita unuo. Resume : *La speso estas la dekmilono de la valoro de ora unuo pezonta 8 gramojn, laŭ la orproporcio 11/12.* Tiu fundamenta unuo estas pure teoria kaj uzota nur por la kalkulo; kutime oni uzos unuojn dekoble, centoble, miloble pli grandajn laŭ la okazoj (same kiel oni uzas jen la centimetron, jen metron, jen kilometron.) Oni, dank'al la Esperanta kunmetado, formos tute laŭlogike la jenajn vortojn : *1 spesdeko* (= 10 spesoj); *1 spesecento* (= 100 spesoj); *1 spesmilo* (= 1000 spesoj). Tiu-ĉi lasta estos la plej praktika unuo ĉar ĝi unuo valoros proksimume 2,50 fr. aŭ 2 markojn aŭ 1/2 dolaron aŭ 1 jenon aŭ 1/4 peson, k. t. p. Jen unuflanke la preciza valoro de la spesmilo komparita kun la diversaj naciaj monunuoj, aliflanke la internacia valoro de la diversaj monoj esprimita per entjeraj nombroj de spesoj :

1 franko = 2,5260 frankoj		1 franko	= 396 spesoj
» » = 2,0331 aŭstraj		1 aŭstra	= 490 »
» » = 0,4875 dolaroj		1 dolaro	= 2051 »
» » = 2,0849 markoj		1 marko	= 480 »
» » = 2,40 kronoj (Aŭstr.)		1 krono (Aŭstr.)	= 416 »
» » = 0,947 rublaj		1 rublo	= 1056 »
» » = 1,82 kronoj (Svedaj.)		1 krono (Svedaj.)	= 550 »
» » = 1,21 germanaj		1 germano	= 826 »
» » = 0,450 aŭstralaj		1 aŭstralo	= 2217 »
» » = 1,031 rupioj		1 rupio	= 970 »
» » = 0,9799 yenoj		1 yeno	= 1021 »
» » = 0,495 pesoj (Meks.)		1 peso (Meks.)	= 2019 »

Laŭ tiu tabelo, internacia monero da 10 spesmiloj estus preskaŭ la samaĵo kiel 1 livro sterliniga, kaj internacia poŝtmarko da 10 spesdekoj (aŭ 1 spesecento) povus esti uzata por la afranko de la leteroj por fremlando. Cetere poŝtmarkoj de 1 speso, 1 spesdeko, 1 spesecento, 1 spesmilo estus tre utilaj por pagi per la poŝto, ĉar tiuj poŝtmarkoj estus ĉie uzebluj kiel internacia mono.

Por akceli la skribon, oni povas mallongigi jene : S = speso; Sd = spesdeko; Sc = spesecento; Sm = spesmilo; kaj en la praktiko oni uzos la spesmiloju kaj spesdekojn same kiel la frankojn kaj centimojn, la markojn kaj pfenigojn, la dolarojn kaj cendojn, k. t. p. ĉar 1 Sm = 100 Sd. Kiel ekzemplon, ni citu la jenan frazon : *la jara abono al « Esperanto » kostas 1, 20 Sm. (unu spesmilo 20 spesdekoj) pagebla per poŝtmandato ; unu numero kostas 4 Sd. (4 spesdekojn).*

El la alpreno de kalkulmono internacia rezultus gravaj plisimpligoj en la komercaj interrilatoj, ĉu privataj, ĉu oficialaj inter la diversaj landoj. Cetere, la praktiko montros en kiaj cirkonstancoj oni povas uzi la internacian monunuon; en la nuna tempo, oni konsideru tiun unuon mur kiel simplan teknikan vorton enkondukotan en nian lingvon, kaj ĉar en la vortaro Esperanta troviĝos la jena klarigo : (Esp.) 1 SPESO = (F.) 0,002526 frankojn = (A.) 0,00010015 liv. st. = (G.) 0,002046 markojn = (U. S. A.) 0,000487 5 dolarojn = ..., oni mir bezonos traduki la valorojn esprimitajn per spesoj en valorojn esprimitajn per nacia mono, same kiel ekzemple, oni tradukos la vorton « patro » ĉu per la Franca vorto « père », ĉu per la Angla vorto « father » k. t. p. Kompreneble, per praktiko, ĉiu kompreneos la vorton *speso* per ĝi nem sen bezono de nacia traduko, tute kiel *patro* elvokas la ideon « père », « father » kvankam ni tute plu ne pensas pri la vorto mem.

La uzado de Esperanto montras pli kaj pli la bezonon de internacia vorto por esprimi monan valoron. Tiu bezono ne estas tiel grava pri sistemo de l'pezoj kaj mezuroj ĉar la Esperantistoj povas konsideri ke la metra sistemo farigis sufiĉe internacia por esti enkondukita en la lingvon.

***

Oni scias, ke dum la lasta kongreso, fondiĝis Internacia Scienca Asocio por sekondukti la lingvon Esperanto ĉe la scienculoj. Baldaŭ en tiu-ĉi Asocio organizigos Internacia Komitato, enhavonta ĉirkaŭe 500 diversnaciajn anojn ; tiu Komitato definitive fiksos la Esperantan traĵukon de la teknikaj terminoj, kies nombro kredeble superos cent mil. Tiuj terminoj, enskribotaj kun naciaj tradukoj sur apartaj karteto, konservotaj en specialaj mebloj ĉe la Internacia Scienca Oficejo, formos la oficialan teknikan vortaron Esperantan. La nomita komitato kredeble estos definitive organizata dum la 2e kongreso ; ĝi havos la taskon akcepti, ŝanĝi, aŭ forjeti la novajn teknikajn esprimojn proponitajn de la diversaj aŭtoroj. Oni vidas do, ke por enkonduki la uzadon de la helpa mono, la plej bona maniero estas akceptigi de tiu Scienca Komitato la vorton *speso* kiel supre difinita ; intertempe oni uzu tiun vorton kiel ian ajn alian teknikan esprimon por provi ĝian taŭgecon aŭ netaŭgecon.

R. de Saussure.

TRA LA MONDO

Aŭstralio

Brisbane, Aprilo 1907.

Oni scias, ke jam de kelka tempo realigis, post longaj klopodoj, la kunfederigo de la Aŭstraliaj kolonioj (nomo Commonwealth). La rezultatoj de tiu kunigo ne estis tiel fruktoplenaj kiel oni antaŭvidis, kaj tion ĉi kaŭzas interalie la politika situacio de la komuna Parlamento. Efektive, en nia lando, neniu el la tri ekzistantaj partioj havas la absolutan plimulton La laborista partio (Labour Party) estas nombre la plej grava ; ĝi havas proksimume tian saman rolon kiel la socialistaj eŭropaj partioj, kvankam ĝia programo nun estas tre modera kaj neniel internaciema. La ministraro Deakin staradas, apogante sin jen sur unu, jen sur alia partio, laŭ la cirkonstancoj. Protekcionismo kaj libersanĝismo, jen estas la principoj, kiuj konstante sin batalas reciproke ; ĝis nun Aŭstralio klinigis al la unua kaj severaj leĝoj estis deciditaj kontraŭ la enmigrado. Tamen, en la nuna tempo, pli bonaj cirkonstancoj favoras la taskon de la registaro. La lastaj rikoltoj estis tre riĉaj kaj tio havis politikan influon. La apliko de la leĝo kontraŭ la enmigrado farigis malpli severa, pro la bezono de laboristoj. Sed la leĝo ankoraŭ ekzistas kaj la sorto de la enmigrantoj dependas de la administracia arbitro. Se okazus denove malbonaj rikoltoj, la antaŭa severeco rec farigus La enmigrantoj envenas nur se ili havas kontraktojn aprobitajn de la aŭtoritato. La Konfederacio baldaŭ havos propran teritorion, kiun forcedis Ŝtato de Suda Aŭstralio. Tiu teritorio, ankoraŭ dezerta, estas trioble pli granda ol Germanujo. Antaŭe, oni supozis, ke ĝi estas senfrukta, sed tio tute ne estas vera ; kontraŭe, ĝi povos produkti en granda kvanto rizon, tabakon, kaŭĉuzon kaj kotonon ; sur la altaj plataĵoj brutaroj povos sin paŝti. La federala registaro prenos sur sin la kolonimigadon de tiu vastega teritorio. Sed se restas la leĝo, kiu malpermesas la enmigradon de la neblankuloj en Aŭstralion, tiu tasko estos malfacile efektivigebla, ĉar, pro la varmega klimato de tiu regiono, la blankuloj versajne ne povos envivadi. Dume, la ĉefministro de Aŭstralio estas en Londono ĉe la kolonia Brita konferenco, kie li sin okupas speciale pri la limiposta tarifo kaj pri la privilegia tarifo kun Anglujo. Tiu demando ankaŭ estas tre grava kaj ne facile solvebla. Aŭstralio havas profiton de siaj protekcionistaj tarifoj kaj ne deziras ilin malpligi eĉ por enlasi la produktaĵojn de Anglujo.

G. A. S.

Balkanujo.

Beograd, Majo 1907.

Beograd (Belgrad) estas efektiva pordo de Balkanujo. Kiam oni forlasas la ferdekon de l'Ŝipo, kiu venis el Zemuno, tute alia aero, tute aliaj vizaĝoj salutas la fremdulon. Beograd estas vera eltrovo de la serĉantaj okulojl. Kiel oni scias forfluĝis interesaj pikantaj novaĵoj politikaj kaj sociaj el la konak'o (serba reĝpalaco) kaj el aliaj specialaĵoj de Serbujo. Ekzemple, la plej nova afero estos, kiel la eŭropa gazetaro jam pli-malpli komunikis kaj komentariis, la vizitvojaĝo de la reĝa Moŝto Petro Ie. Petro, la nuna serba reĝo, estas multflanke energia posteulo de Karaĝorĝeviĉa dinastio. Li riceris la sendube malfacilan rolon rekonstrui kaj reorganizi la senordan kulturvivon de Serbujo sur la malpurigita serba trono. Naturo, en la okuloj de la kulturlandoj, precipe monarhiaj, ĉiam restas la rememoro pri la terura sanĝokazintaĵo pri la lasta serba tronsanĝo ; ĉiu nur vidas la mutajn sangmakulitajn kadavrojn de la lastaj malfeliĉaj rolludintoj de Obrenoviĉ'a dinastio. Estas vero, ke la fakto mem estas terura, sed por la serba popolo, la nuna solvo estas senkompare pli favora el la antaŭaj. Nun, la serba reĝo volas fine forigi la ĝisnunan izolecon, kaj aperigis la serban popolon kaj la nunan estraron de l'aliaj nacioj kaj aliaj reĝaj moŝtoj. Kiel mi supre diris, laŭ la plej novaj sciigoj, kiuj elfluis el la kulisoj diplomatiaj, Petro Ie decidis dum la nuna somero viziti kelke da eŭropaj reĝoj, komencante ĉe Vieno. Laŭ sciigoj, tiu entrepreno estus tute malsukcesa ; ĉar Aŭstrihal, la nuna hungaraŭstra diplomat-ministro petis de lia reĝa Moŝto Franco-Jozefo Ia, ke li akceptu la projektitan viziton, sed li ricevis de la maljuna monarĥo nur malfavoran opinion pri la lasta sanga serba okazintaĵo. Pri la aliaj vizitoj, ni ankoraŭ ne povas ion ajn poziitivan skribi. Tiuj novaĵoj min instigis kiel eble plej baldaŭ viziti Beograd.on. Mi tuj sciigis pri tiuj ĉi aferoj, sed versajne pro la malfavoraj eksterlandaj aferoj, oni tre sekrete subpremas ĉian novan sciigon.

***

Se oni rigardas la serban ĉefurbon, ĉie oni vidas militistojn. La serban militistaron oni povas karakterizi jene : ĝi konsistas el lukse vestitaj oficiroj kaj el militistoj, kiuj estas ĝenerale en tre malpriĉa kaj plorinda kondiĉo. La oficiroj troviĝas multenombre en ĉiu strato. Vespere, kiam mi sidis sur la teraso de « Ruski Car » (gastejo kun titolo « Rusa Caro ») kaj rigardadis la promenantojn, kiuj foren onediĝis sur la strato, ĉiam min mirigis la belaj oficiroj, kiuj promenadis ĝiritindante. Beograd.on oni vere povus nomi la urbon de l'banko ; ĉui tria vendejo estas banko. Kien ajn oni rigardas, oni renkontiĝas kun la konata ŝildo « Saraf » (monŝanĝisto). La urbo mem estas ne granda kaj ne tro ĉefurba. Ni povas pensi, ke ni estas en la beta urbeto dekaranga. La jam iomete granda vendejo ĉiam havas en sia kaso grandajn sumojn (eĉ la mezaj 40.000 ĝis 50.000 frankoj), ĉar ili malgraŭ la multeco de bankoj ne kondiĉas al ili ! La serba poŝto — laŭ la kritiko — estas nete tre bona, ĉar la plej multaj komercistoj ŝipveturas en Zemunon kaj tie reguligas siajn aferojn financajn kaj korespondajn ! Pro tio, kvankam Zemuno ne estas ĉefurbo, tamen ĝi havas du grandajn poŝtoficejojn, pli grandajn ol tiu de Beograd.

Beogrado ludis iam grandan rolon en hungara historio, apartenante tiam al Hungarujo kaj havante la nomon « Náudorfehervar ». (Ferdinandblanka fortikaĵo). La nuna nomo Beograd estas la laŭvorta traduko de « blanka fortikaĵo ». Dum la turkaj bataloj, multafoje ŝanĝis ĝiaj posedantoj. Beogrado kuŝas sur du riverbordoj, inter Danubo kaj Savo. Belega vidaĵo ĝojigas la ĝuemajn okulojn, kiam oni starante sur la urbmonto « Kalimekdan » ekvidas la du riverojn; en la bluajn majestajn ondojn de Danubo, ribele enmiksiĝas la malpuraj flavverdaj ondoj de Savo kaj duflanke ŝaŭmigas la piedojn de l'urbmonto, kies kapo estas kronita per fortikaĵa diademo.

La popolo estas tre simpatia, poeziema kaj muzikema. Belaj virinoj ankaŭ pligrandigas la amindecon de ĉi tiu popolo. Dek fojojn mi estis en Beogrado kaj vizitis ankaŭ la ĉirkaŭaĵojn. Pri aliaj specialaĵoj, kulturvivo kaj socia vivo mi plej baldaŭ raportos.

A. de Marich.

Germanujo.

Leipzig, Majo 1907.

La dua germana kongreso de Esperanto, okazinta de la 8-a ĝis 12-a de majo en Dresden, estas grava pruvo, ke Esperanto sukcese progresadas en Germanlando. 800-1000 esperantistoj kaj interesatoj, inter ili kelkaj Anglaj kaj Rusaj gesamideanoj, ĉeestis la publikan ĉefan kunvenon en la granda salonego de « Vereinshaus ». La fama scienculo, P-ro D-ro W. Ostwald paroladis pri la demando de internacia lingvo. Li rimarkigis, ke la publika intereso pri la afero daŭre pligrandiĝas, ke oni jam nun povas prijuĝi la intelektan staton de la gazetredakcioj laŭ la intereso, kiun ili montras por la problemo de helpa lingvo. Helpa lingvo estos same signifa por la plua disvolviĝo de la homa kulturo, kiel la elpenso de libropresiĝo. Per tia lingvo estos eble internacie konatigi la verkojn de poetoj kaj scienculoj. Enkonduko de internacia lingvo forigos grandparte lernadon de aliaj fremdaj lingvoj kaj treege malŝarĝos la infanojn, kiuj nun devas oferi 50 % de la lerntempo al fremdaj lingvoj. Oni do povas gajni multe da tempo por aliaj pli utilaj aferoj, ĉar lernado de multaj lingvoj ne plisaĝigas la homojn. Nacia lingvo estu kaj restu patrina lingvo, uzata en la interno de la familio, de la hejmo, de la nacio. Sed apud la patrina lingvo ekzistos patra lingvo por ĉiuj rilatoj kaj interesoj, kiuj ne havas naciajn linojn. Kvankam P-ro Ostwald ne konfesas sin Esperantisto tamen li certe esperas, ke la du riveroj « Esperanto » kaj « Delegacio » baldaŭ kunfluos en unu riveregon. Poste P-ro D-ro Schmidt montris, ke Esperanto estas vera kaj praktika solvo de la granda problemo: lingvo internacia.

En laboraj kunsidoj Germana Esperantista Societo decidis dividi Germanlandon laŭ geografiaj distriktoj por plibonigo de la propagando. Krom tio oni intencis starigi specialajn propagandajn komitatojn por apartaj profesioj; jam estas elektita provizora komitato, kies tasko estos la disvastigo de Esperanto inter la komercistaro. Esperantaj libroj estos dissendataj senpage al publikaj bibliotekoj. Por prizorgi la sciencan flankon de Esperanto oni rekomendis kuniĝon de la germanlingvaj anoj de la Internacia Scienca Asocio Esperantista en Genevo. Dum la ferma kunveno D-ro Mybs, prezidanto de G. E. S. faris paroladon pri elparolado de Esperanto. Li pritraktis la temon laŭ scienca fonetika bazo. Estas neeble, ke ĉiuj nacioj kaj individuoj elparolas Esperanton tute sammaniere. Sed diferenco nur konsistas el la diverseco de la sonnuanco de la vokaloj, precipe de la kunmetitaj vokaloj (diftongoj). En la internaciaj Esperantistaj kongresoj la parolanto konvinkiĝis ke la malsameco de la vokalnuancoj tute ne malhelpas bonan interkompreniĝon. Tial ne estas necese zorge eviti la naciajn parolnuancojn en internacia lingvo. Por la kongreso granda Ekspozicio estis aranĝita en la malnova parlamentejo, ĝi enhavis multe da lernolibroj kaj alia Esperanta literaturo kaj sukcese propagandis inter la neesperantista Dresden'a publiko. Dum la kongreso la Dresden'a Esperantista Grupo zorgis pri kelkaj ekskursoj en la ravigan ĉirkaŭaĵon, pri ŝipveturadoj sur la Elbe, pri Esperantaj muzikaj reprezentadoj k. t. p. La Kongresanoj forlasis Dresdenon konvinkiĝinte, ke nia kara lingvo ankaŭ venkos en Germanlando.

P.

Tutmonda Kroniko

Majo 1. Berlino. — Princo Bülov parolas ĉe la Reĥstago pri la internaciaj rilatoj de Germanujo. — Alveturas la ministro de l'eksterlandaj aferoj de Aŭstrujo.

2. Lisabono. — Luciano Montero formas la novan ministraron.

Parizo. — Mortas la fama ĥirurgiisto Poirier.

Berlino. — La Reĥstago aprobas la novan komercan interkonsenton kun Unuigitaj Statoj.

3. Bruselo. — S-ro de Trooz formas novan ministraron.

4. Dublino. — Inaŭguracio de Irlanda internacia ekspozicio.

Galicio. — Urbo Nadvorna estas detruita de brulado.

Yemen (Arabujo). — Malvenko de la Turka soldataro kontraŭ ribelantoj.

Kantono. — Eksplodo de pulvejo: 20 mortintoj.

6. Madrido. — Balotoj por la Senato. Estas balotitaj: 113 konservativuloj, 23 liberaluloj kaj 29 anoj de 7 aliaj partioj.

Varsovio. — Brulado detruas urbon Tyszcowe.

7. Amritsar (Indujo). — Ribelado kontraŭeŭropa.

8. Urugvajo. — La franca vaporŝipo « Poitou » pereas apud la marbordoj; 60 dronintoj.

9. Romo. — Grava diskutado ĉe la deputataro pri la ĉeesto de l'armeo ĉe la ricevo de kardino Lorenzelli en Luko.

Mortas senatano eksministro Codronchi.

10. Madrido. — La hispana reĝino naskas reĝidon; la Papo estos la baptopatro.

12. Teherano. — Tumultoj en Persujo.

Parizo. — Inaŭguracio de monumento al Gabriel Trarieux, iniciatinto de la Ligo de l'homrajtoj.

Catanio. — Inaŭguracio de busto al poeto Rapisardi.

Lisabono. — Kontraŭdinastiaj manifestacioj.

Peterburgo. — Oni malkovras komploton kontraŭ la Caro.

Parizo. — Mortas la romanverkisto S. K. Huysmans.

13. Madrido. — Malfermo de la Parlamento.

Rio-de-Janeiro. — Oni malpermesas la elŝipiĝon de princo Orleans de Braganzo.

14. Vieno. — Generala balotado laŭ la nova leĝo. Estas balotitaj: 43 socialistoj, 39 kontraŭsemiduloj, 20 klerikanoj, 21 de la aliaj partioj. Multaj rebalotoj.

Parizo. — Diskutado ĉe la deputataro pri la politiko de la ministraro rilate al la movado de la ŝtatoficistoj. Venko de la ministraro.

15. Romo. — Diskutado ĉe la deputataro pri la ekstera politiko. Parolado de ministro Tittoni.

16. Beziers (Francujo). — Tumultoj pro la vinkulturistoj.

17. Londono. — Malfermo de rusa socialista kongreso.

A. Tellini.

ESPERANTO PRAKTIKA

DIVERSAĴOJ

Imitindaj ekzemploj. — Ni ricevis la jaran Revueton de la Esperantista Grupo en « Le Creusot » (Francujo) en formo de interesa dulingva broŝureto. Krom sciigoj pri la IIa kaj IIIa Kongresoj, ni kun plezuro legis raporton pri la konsulejo kaj Oficejo, kiuj funkcias en tiu urbo kaj estas plej bone organizataj. Nia kunlaboranto S-ro Rousseau jam priskribis tiun *imitindan* organizecon en № 1 de « Esperanto ».

La Grupo en Beaune ankaŭ publikigis sian jaran revueton, en kiu estas legeblaj sciigoj pri la konsulejo kaj oficejo organizitaj en tiu urbo.

La Grupo de Tours dissendis al ĉiuj gazetoj noton, per kiu ĉiuj esperantistoj intencantaj viziti Tours'regionon sin turnu al la esp. hotelmastroj kaj parolu en Esperanto. La hotelistoj de tiu urbo, post vizito de la konsulo, promesis uzi la Esperanto-Oficon. De nun Esperantistoj vizitu Tours'on kaj la pentrindan ĉirkaŭaĵon, ili estos komprenataj. Baldaŭ aperos *esperante redaktita* gvidlibro de Tours'lando, eldonita de l'Iniciata Sindikato de la dirita urbo.

Jen tiom da ekzemploj meditindaj de *ĉiuj* grupoj esperantistaj.

* * *

Festoj Esperantistaj

Burgonja Esperantista Kongreseto. (El speciala Korespondanto). — Dimanĉon 12an de Majo okazis en Autun (Francujo) kongreseto de l'Burgonjaj Grupoj, organizita de l'Creusota Grupo. Pli ol 100 delegitoj el Dijon, Beaune, Creusot, Autun, Chalon, Nolay, Pierre, Mercurey kunfestenis en belega manĝoĉambro ornamita de verdaj arbetoj, bonodoraj printempaj floroj kaj plibeligita de multaj amindaj sinjorinoj kaj fraŭlinoj. Multaj tostoj ĉe la deserto. S-ro Decouches diras bonvenon al la Autun'a grupo kaj al ĝi prezentas la bondezirojn de ĉiuj Burgonjaj grupoj. Parolis ankaŭ S-ro Vesoul, Boudrillot, Boitard, Heluin, Dejussieu, Jadeau, kaj fine S-ro Bord, la « patro » de la Burgonjaj grupoj. Poste okazis kunveno ĉe la Urbdomo; la grupoj decidis, ke la Sidejo de l'generala sekretario ŝanĝos ĉiujare. S-ro Heluin akceptas unue tiun taskon. Oni ankaŭ decidis festi la 21an de julio kunigante la plimulton de la Burgonjaj geesperantistoj en la urbo. Kantoj kaj deklamoj finis tiun sukcesan kongreseton, kiu denoviĝos la 21an de julio por glori nian karan majstron.

Vidinto.

Esperantista festo en Hispanujo. — Bela festo okazis en Sabadell (Katalonujo) la 7an de Aprilo okaze de vizito de 16 Barcelonaj samideanoj al la Sabadell'aj esperantistoj: Multenombra publiko-ĉirkaŭ 400 personoj. S-ro Sabadell, prezidanto de la Barcelona grupo kaj riprezentinto ĉe la Geneva kongreso, faris belegan paroladon tre aplaŭditan. Sekvis kantoj, deklamoj, paroladoj. Resume, belega festo, kiu devas esti sekvinda ekzemplo.

V. I.

INTERNACIA SOCIETO DE L' ESPERANTISTAJ JURISTOJ (I. S. E. J.)

Oficiala Informilo

Dum la Geneva Kongreso fondiĝis inter la esperantistaj ĉeestantaj juristoj *Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj.*

FELIETONO DE "ESPERANTO" 1

LA LEGENDO DE SANKTA JULIANO HELPEMA

el Gustave FLAUBERT

(trad. H. Hodler)

La gepatroj de Juliano loĝis en kastelo, meze de l'arbaroj, sur monteta deklivo. Ĉe la anguloj, la kvar turoj havis pintajn tegmentojn tegitajn per plumbaj skvamoj, kaj la fundamento de la muroj sin apogis sur amasoj de ŝtonegoj, kiuj interniĝis krute ĝis la fundo de l'fosaĵoj. La pavimoj de l'korto estis tiel netaj kiel la ŝtonplatoj de preĝejo. Longaj defluiloj, figurantaj drakajn faŭkojn, elĵetis al la cisterno la pluvajn akvojn, kaj, sur la fenestroj, ĉe ĉiuj etaĝoj, floradis en pentrita argilpoto basilisko aŭ heliotropo. Dua murzono, farita per fostoj, enspacis fruktarban kampon, bedon, sur kiu kunaranĝo de floroj desegnis ciferojn, refreŝigan laŭbon kaj majlludon por la distrado de l'paĝioj; ĉe l'alia flanko troviĝis hundejo, ĉevalejo, panfarejo, vinberpremilo kaj garbejo; ĉirkaŭe disvolviĝis verda paŝtejo, enfermita per fortika duonplektaĵo. De tiel longatempe oni pace vivadis, ke jam ne leviĝis la erpilo; la fosaĵoj estis akvoplenaj; hirundoj konstruis nestojn ĉe la fendoj de la murdentoj, kaj la pafarkisto, kiu dum la tuta tago promenadis sur la remparo, tuj kiam brilis tro akre la suno, reiris la gardejon kaj ekdormis kiel monaĥo. Interne, ĉie montriĝis la feloj; en la ĉambroj, tapetoj ŝirmis kontraŭ malvarmo; kaj la ŝrankoj estis plenegaj de tolaĵoj, kaj en la keloj amasiĝis la vinbareloj, kaj sub la pezo de la monsakoj krakadis la kverkaj kofroj. En la ĉambro de la armiloj, inter standardoj kaj kapoj de sovaĝaj bestoj, vidiĝis ĉiatempaj kaj ĉianaciaj armiloj, de la Amalekidaj ŝtonĵetiloj kaj Garamantaj sagegoj ĝis la Sarazenaj glavetoj kaj Normandaj maŝkirasoj. La ĉefa trapikilo de la kuirejo povis transturni bovon. La kapelo estis luksa kiel reĝa preĝejo. Eĉ, en aparta loko, laŭ la Romana modo, troviĝis ŝvitbanejo, sed ĝin ne uzis la bona kastelmastro, ĉar li opiniis, ke tio taŭgas nur por idolanoj. Ĉiam ĉirkaŭvolvita per vulpa felo, li promenadis tra sia hejmo, juĝadis siajn vasalojn, pacigadis la interdisputojn de siaj najbaroj. Dum la vintro, li rigardadis, kiel falas neĝeroj, aŭ lasis al si rakontadi fabelojn. Je l'unuaj belaj tagoj, li laŭ la vojoj rajdadis sur sia mulo, apud la verdiĝantaj grengarboj kaj paroladis kun la servutuloj, al kiuj li donis konsilojn. Post multaj aventuroj, li edziĝis kun altranga fraŭlino. Tre blanka ŝi estis, fiereta kaj serioza. La kornoj de ŝia harornamo atingis ĝis la supro de l'pordoj; kaj per tri paŝoj postetrenis ŝia robo. La servistaro estis tiel regula kiel monaĥaro; ĉiumatene, ŝi disdonis taskojn al siaj servistinoj, kontrolis la faradon de la konfitaĵoj kaj ŝmiriloj, ŝpinadis aŭ brodadis altartukojn. Post multaj preĝoj al Dio, ŝi naskis filon.

Tiam okazis grandaj festoj, tritaga kaj kvarnokta festenego sub la foliaroj, ĉe la lumo de l'torĉoj, dum sonadis la harpoj. La plej maloftajn spicojn oni manĝis kun kokinoj grasaj kiel ŝafoj; kiel amuzilo, pigmeo eliris el pasteĉo; kaj, ĉar ne sufiĉis la vazoj, pro la konstanta plimultiĝado de la popolamaso, oni devis trinki el olifantoj kaj kaskoj. Tiujn festojn ne ĉeestis la naskintino. Sur la lito ŝi trankvile kuŝadis. Vespere, ŝi vekiĝis, kaj ĉe lunradio envenanta tra la fenestro, ŝi ekvidis kvazaŭ moviĝus ombro. Tio estis maljunulo vestita per lana robo kun rozario ĉe la flanko kaj sako sur la ŝultro. Li tute ŝajnis ermito. Li proksimiĝis al ŝia lito kaj diris, ne disŝremante la lipojn: « Ho, ĝoju, patrino! cia filo estos sanktulo ». Ekkrii ŝi volis, sed, glitante sur lunradio, li senbrue forflugis aeren kaj malaperis. Pli laŭte sonis la voĉoj de la festenantoj. De l'anĝeloj ŝi aŭdis la voĉojn, kaj refalis ŝia kapo sur kusenon, kiun kronis martirosto enkadrigita per karbunkoloj.

La morgaŭan tagon, ĉiuj pridemanditaj servistoj diris, ke ili ne vidis ermiton. Songaĵo aŭ realaĵo, tio estis certe komuniko de l'ĉielo; sed ŝi pri tio nenion diris por ke oni ŝin ne kulpigu pri gloramo. La festenintoj matenfrue foriris, kaj la patro de Juliano troviĝis ekstere de l'trinkejo, el kie li jus forsalutis la gastojn, kiam subite, tra la nebulo, stariĝis almozulo. Li estis vagisto kun plektita barbo, du arĝentaj ringoj ĉe la brakoj kaj flamemaj pruneloj. Li kvazaŭ inspirite senorde balbutis tiujn vortojn: « Ha, ha! cia filo!... multo da sango'... multo da gloro!... ĉiam feliĉa!... imperiestra familio... » kaj malstariĝinte por preni la almozon, li forperdiĝis en herbon, neniiĝis. La bona kastelmastro, jen dekstre, jen maldekstre, rigardadis, vokadis per tuta forto. Neniu! Siblis la vento kaj fornaĝis la matenaj nebuloj. Tiun vizion li aljuĝis al korpa laciĝo pro sendormeco. « Se pri tio mi parolos, oni min mokos » li diris al si. Tamen, lin blindigis la belegaĵoj difinitaj por lia filo, kvankam la promeso estis ne klara, kaj li eĉ dubis, ke li aŭdis ĝin. La geedzoj silentis pri sia sekreto. Sed ambaŭ per egala amo adoris kaj respektis sian infanon, kiel senditon el Dio. Lia lito estis ŝtopita per la plej delikata lanugo; super ĝi konstante lumigadis lampo en formo de kolombo; lin luladis tri nutristinoj; kaj premita per vindotukoj, kun rozkolora mieno kaj bluaj okuloj, kun orŝtofa mantelo kaj perla kufeto, li similis al Jesuo infano. Al li kreskis la dentoj sen ploro. Kiam li estis sepjara, lia patrino lin instruis pri kantado. Por lin bravigi la patro lin metis sur grandan ĉevalon. La infano ridetis de kontentiĝo kaj baldaŭ elsciis ĉion pri rajdado. Maljuna, tre klera, monaĥo lernigis al li la Sanktan Skribon, la nombradon de la Araboj, la latinan alfabeton kaj la pentradon de la literoj sur veleno. Ili kune laboradis, ĉe l'supro de l'turo, for de ĉia bruo. Post la leciono, ili malsupreniris en la ĝardenon, kie ili, dum promenado, studis la florojn. Kelkafoje, oni ekvidis, irantan en la fundo de l'valo, sekvantaron de ŝarĝbestoj, kondukitaj de piediranto orientale vestita. La kastelmastro, kiu en li rekonis fremdulon, forsendis serviston. La fremdulo konfideme deturnis sin el la vojo, kaj enkondukita en la parolejo, li el la kofroj eltiris velur-kaj silkŝtofojn, oraĵojn, aromojn, strangaĵojn por uzado nekonata; fine, kun ŝatinda profito, foriris la negocisto suferinte nenian perforton. Alifoje, bando de pilgrimantoj frapis ĉe la pordo. Iliaj malsekaj vestaĵoj fumis antaŭ la fajrujo: kaj, post satiĝo, ili rakontadis pri siaj vojaĝoj: la vagadoj de l'ŝipoj sur la ŝaŭmanta maro, la piediradoj sur la varmegaj sabloj, la kruelegeco de la idolanoj, la kavernoj de Sirio, la sankta Manĝujo kaj Tombo. Kaj al la juna sinjoro, ili donis konkojn el sia mantelo. Ofte, la kastelmastro festenis kun siaj malnovaj kunmilitintoj. Trinkante, ili rememoradis pri la militoj, la atakoj kontraŭ la fortikaĵoj kun la batado de la maŝinoj kaj la teruraj vundoj. Juliano, ilin aŭskultante, ekkriis, kaj tiam ne dubis la patro, ke lia filo fariĝos almilitisto. Sed vespere, post la anĝeluso, kiam li paŝis inter la kliniĝintaj malriĉuloj, li el sia monujo ĉerpis kun tia modesteco kaj nobleco, ke ŝia patrino esperis, ke li fariĝos arĥiepiskopo.

(daŭronta).

La nomita societo celas unuflanke konigi Esperanton al la advokatoj, solicitoroj, leĝosciencistoj, aliparte faciligi kaj akceli la aferajn rilatojn inter la diverslandaj juristoj. Jam aliĝis anoj de pli ol 15 nacioj, nome Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Danujo, Brazilujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Rumanujo, Svisujo, Unuigitaj Statoj, k. t. p. Konstanta sekretariejo estis fondita en Bulonjo. Krom tio, la vortaro de la esprimoj specialaj al jurscienco estas en preparado. Ne estas necese insisti pri la servoj de Esperanto por tiu ĉi fako. En tre multaj okazoj, juristo estas devigata, pro siaj profesiaj devoj, komuniki kun alilandaj kolegoj kaj scii pri kio okazas en la plej diversaj landoj. Dank'al Esperanto kaj tuj de nun, ĉiu juristo povas, ĉu sin turni al la sekretariejo en Bulonjo, ĉu senpere interrilatiĝi kun alilandaj esperantistaj juristoj, kiuj liveros al ili ĉiujn sciigojn pri la leĝoj, regularoj, aktoj de sia propra lando. Aliĝinte al la societo, ĉiu trovos en kia ajn lando korespondanton, tion pli fidindan, ke li estas mem enlandulo. Tiu atentinda rezultato estas jam nuntempe ricevebla, ĉar ekzistas esperantistaj Juristoj en ĉiuj landoj, kaj oni povas esti certa, ke ilia nombro rapide pligraviĝos, tuj kiam la celo de la dirita societo estos ĉie konigita. Ni do varme admonas ĉiujn esperantistajn juristojn, ke ili sin konigu kaj aliĝu senprokraste al la Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj, kiu al ĉiu liveros praktikan manieron uzi Esperanton por profesia utilo.

Nomaro de l'anoj

Honora prezidanto: D-ro L. Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. — Ampt, W.-M., Attorney at law, Walnut Street, Cincinnati (Ohio) Un. Stat. Amer.). — Appleton Paul, advokato, doktoro en Juroscienco, Anstatauanta profesoro ĉe la Universitato de Juro, 2, Rue Monge, Paris (Franc.). — Avellino Lucrecio, advokoto, rua de Fialho, Rio de janeiro (Braz.). *Vicprezidanto por Brazilujo.* — Belpaume Gaspard, juĝa persekutisto, 12, rue du Collège, Château-Thierry (Franc.). — Benoist Emile, juĝa persekutisto, 16, rue Turbigo, Paris (Franc.). — Blavot Henri, juĝakonfidato (avoué) ĉe la alvokkorto, 6 bis rue Lavoisier, Paris (Franc.). — Bloquel Henri, juĝakonfidato (avoué), Doktoro en Juroscienco, Montreuil-sur-Mer (Franc.). — Blott Arthur, Solicitoro, 39, Broadway, Stratford (Angl.). — Boka Manrice, advokato, Sekretario de la Societo por l'Internacia arbitracio, 8, rue Dante, Paris (Franc.). — Boutique Marcel, Studento en Juro, 22, 24, rue Saint-Thomas, Douai (Franc.). — Bottin G., esplorjuĝisto, 37, rue Morel, Douai (Franc.). — Boyer Justin, subinspektoro de registrado, 55, boulev. Carnot, Le Puy (Franc.). — Bracks Otto, advokato, Brunschweig (Germ.). — Buret Henri, notario, Sainville (Eure-et-Loire), (Franc.). — Charu Chandra Das, advokato, Gorakhpur, (Hind.). *Vicprezidanto por Hindujo.* — Chaussard Emile, Notaria eksoficisto; 127 bis, faubourg Bannier, Orléans (Franc.). — Coutelier L., advokato, 687, Calle San Martin, Buenos-Aires (Rep. Argent.). — Crozat Pierre, advokato, 12, rue de la Victoire, Paris (Franc.). — Daniel Emile, Generala Persekutisto de la Respubliko, Bourges (Franc.). — Degon Paul, juĝakonfidato (avoué) ĉe la alvokkorto, 17, rue Saint-Eloi, Douai (Franc.). *Vicprezidanto por Francujo.* — Delayen Gaston, advokato, 95, rue des Petits-Champs, Paris (Franc.). *Delegito de la Societo por la alvokkorto de Paris.* — Donaldson S. Rose, advokato, 259, Union Street, Aberdeen (Skotujo). — Duniecki (Von), Ritter, advokato, doctoro en Juroscienco, 1, 3, Elisabeth Strasse, Wien (Austr.). *Vicprezidanto por Aŭstrujo.* — Dupuenoy Gaston, advokato, 42, Grand'-Place, Saint-Omer (Franc.). — Easson Alexander, Solicitoro, 50, Queen Street, Edinburgh (Skot.). — Ellis John, solicitoro, Bow Street, Keighly (Angl.). *Vicprezidanto por Anglujo.* — Fauvart, advokato, 12, rue Vauban, Dijon (Franc.). — Fenton James, solicitoro, 30, Kurray Gate, Dundee (Skot). — Fonrobert René, advokato, boulev. Lafayette, Calais (Franc.). — Garrau J., juĝakonfidato (avoué), 1, rue Gouvion, Bordeaux (Franc.) — Garzon Y Ruiz, José, advokato, St. M. Torrero, 10, San-Fernando (Hisp.). — Gentet F., advokato, doktoro en juroscienco, 4, Place Molard, Genève, 4 (Svis.) — Guyot-Sionnest, juĝakonfidato (avoué), 20, rue Montpensier, Paris (Franc.). — Horion, notario, Villers-aux-Tours, par Anthismes (Belg.). — Husson Henri, leŭtenanto, studento en Juro, boulev. Crespel, Arras (Franc.). — Irquierdo Lucas, Castellan (Hisp.). — Jardel Ludovic, advokato, doktoro en Juroscienco, rue des Potiers, Douai (Franc.). — Jose de Seyer y de Aropa, sekretario de Juĝistaro, Castellan (Hisp.). — Kirkland J.-W., 20, George Street, Edinburgh (Skot). — Klein Martin, Vertreter, XIX, Wien (Austr.). — Laignier Marcel, ĉefoficisto de juĝakonfidato, 59, rue Libergier, Reims (Franc.). — Lambert Daniel, solicitoro, 4, Great Winchester Street, London, S. E. (Angl.). — Legrand René, advokato, 22, rue d'Havré, Tourcoing (Franc.). — Letellier Alfred, advokato-defendisto, eksdeputato, Alger (Algerujo). — Lizot René, advokato, 19, rue de Soubise, Dunkerque (Franc.). — Maillard Victor, advokato-konsilanto, eksnotario, agento de anglaj solicitoroj, 10, rue de la Paix, Paris (Franc.). — Malloch James, solicitoro, 34, Castle Street, Edinburgh (Skot). — Michaux Alfred, advokato, vicprezidanto de la Franca Societo por la propagando de Esperanto, 26, rue Vissocq, Boulogne-s-Mer (Franc.). *Prezidanto de la Societo.* — Monster G., 28, Osterbrogade, BIV. Kobenhavn (Danujo). — Morel A., juĝakonfidato (avoué), 36, rue de Metz, Toulouse (Franc.). — Negreanu, 62, Str. Mircea, Voda, Bucuresti (Ruman.). — Nottin Ernest, notario, 23, rue d'Anjou, Paris (Franc.). — Noury Georges, advokato, 23, rue de la Gare, Neufchatel-en-Bray (Franc.). — Olympio de Mello Mathias, Piauhi (Braz.). — Page William, advokato, 31, Queen Street, Edinburgh (Skot.). *Vicprezidanto por Skotujo.* — Pedersin Jehan, Aarhus (Danujo). — Pino Alegret Andres, advokato, 5, Calle de la Museo, Valencio (Hisp.). — De Prat, advokato, rue du Clocher Saint-Pierre, Douai (Franc.). — Priester Friedrich, doctor, advokato, Trautsohngasse, 2, Wien (Austr.). — Pujula y Valles, advokato, Barcelona (His.). — Ritzau Viggo, komisisto, Ebeltoft (Dan.). — Rumpel Paul, 10, Rhediger Strasse, Breslau (Germ.). — Second Maurice, juĝakonfidato (avoué), 46, rue de la Paroisse, Versailles (Franc.). — Sergeant Lucien, advokato, doktoro en juroscienco, 31, boulev. Mariette, Boulogne (Franc.). *Sekretario de la Societo.* — Smith Ernest, solicitoro, 77, Saint-Vincent Street, Glasgow (Skot.). — Smith Wilson, solicitoro, 77, Saint-Vincent Street, Glasgow (Skot.). — Toulouse, licencato en juroscienco, rue de Douai, Lens (Franc.). Truptil Maurice, juĝakonfidato (avoué), Neufchâtel-en-Bray (Franc.). — Vernier Ch., villa Roger, Monte-Carlo (Monako). — Voituret H., konfidato akceptata de la komerca juĝistaro, Auxonne (Franc.).

Avizoj

La Societanoj rajtas ricevi senpage « Esperanto », kiu estas la Oficiala organo de la Societo. Ĉiu societano de l'I. S. E. J. kiu ĝin ne ricevus, regule, estas tre insiste petata tuj skribi al la Sekretariejo, por plendi.

Por ĉiuj ŝanĝoj, aldonoj, observoj pri eraraj nomoj, aŭ adresoj, sin turni al S-ro Sergeant, ĝenerala sekretario, 31, boulev. Mariette, Boulogne-sur-Mer, Francujo.

Ni tre insiste petas niajn anojn sendi al la sekretario, sciigojn, artikolojn, k. t. p.

IIa Generala Kunveno de l'Internacia Societo de l'Esperantistaj Juristoj

L'I. S. E. J. kunvenos en Kambridge dum la 3a Kongreso Universala de Esperanto. Ni publikigos baldaŭ la proponojn faritajn de la anoj. La proponoj novaj estos akceptataj ĉe la sekretariejo ĝis la 15an de Julio. La Trio rezervas al la Societa kunveno salonon, ni sciigos la tagojn kaj horojn de la kunvenoj; tre eble du kunvenojn ni faros: la unua por ekzameni la proponojn kaj precipe la regularojn faritajn por la Societo; la dua por voĉdoni pri ilia aprobo. Ni esperas ke la Societanoj estos multaj en Kambridge'o kaj partoprenos al la ĝenerala kunveno; la kunveno estas la plej bona okazo por helpi kaj fortigi nian kunfratecon.

INTERNACIA UNUIĜO DE LA STUDENTOJ ESPERANTISTAJ (I. U. S. E.)

Oficiala Informilo

Al ĉiuj sendintaj al mi sian aprobon.

Karaj Kolegoj. — Dank'al speciala aranĝo, ni povas presigi en ESPERANTO niajn sciigojn kaj pro tio ni petas vin, kolegoj, por la sukceso de nia afero, sendi al mi viajn kotizaĵojn, ĉar tiam mi povos scii kiom da membroj estas en Unuiĝo kaj al kiuj aprobantoj mi devas sendiĝi la jurnalon. Ankaŭ mi plezure ricevos la artikolojn, kiuj koncernas la demandojn pri propagandiloj, proponoj interesaj por la sukceso de nia Unuiĝo, k. t. p. Oni sendu tion antaŭ la 1 kaj 15 de ĉiu monato. La regularon kaj informojn ĉiu studento povas ricevi senpage, sed mi petas aldoni poŝtmarkon, ĉar mia korespondado estas tro granda. Sciigojn ankaŭ povas doni la sekretario kaj prezidanto de nia grupo. Mi esperas, ke vi plenumos niajn petojn kaj en venonta № ni legos resumon pri la stato de nia afero, kaj ion pri nia biblioteko.

La kasisto: R. Sakoviĉ, Novo-Petergofsij, 18, St-Peterburgo.

Nomaro

1. A. Porfirjev, Allejnaja str. 62, Turjev (Rus.). — 2. Genty, r. Ursulins, Paris (Franc.). — 3. R. Dousset, Astourval, par Bar-s-Aube (Franc.). — 4. — H. Helie, 8, rue du Chemin de fer, Maisons-Alfort, (Seine, Franc.). — 5. E. Bouvier, r. Maraichers, 55, Genève (Svis.). — 6. K. Stehle, Beughaupstr. 43, Zürich (Svis.). — 7. P. Laire, Collège de Peronne (Somme, Franc.). — 8. F. Leroy, Ecole Normale, Arras (Franc.). — 9. M. Gosselin, 187, rue St-Denis, Courbevoie, Paris (Franc). — 10. Fr. Skog, Kyrkobacken, Falun (Sved.). — 11. Mihalev, Akademitcheskaja dom Timofeevoj, Kazan (Rus.). — 12. S. Koeff, Seminario bulgara, Chichli, Konstantinoplo (Turk.). — 13. A. Lamera, Alameda Mazarredo 8, Bilbao (Hisp.). — 14. A. Kobylinskij, str. Novogrodzka 17-20, Varsovio (Rus.) — 15. Dzemborovskij, str. Vleza 56-27, Varsovio (Rus.). — 16. O. de Azenedo, str. Ourives 85, Rio-de-Janeiro (Brazil.). — 17. J. Noa, Bruckberg 16, Siegburg (Germ.). — 18. O. Hanesko, Obchodni Akademie, Prostejov, Moravio (Aŭstr). — 19. Kartasinskij, str. Vronja 64-7, Varsovio (Rus.). — 20. Urvoy, Belle-Fontaine, 40, Lorient (Franc.). — 21. San Bernhard, 100 Karlin, Bohemujo (Aŭstr.). — 22. M. Blicher, Dosseringen 81-III Kjopenhago (Dan.). — 23. Karel Striz, Vesela 39, Brno, Moravio (Aŭstr.). — 24. K. Bendix, 27 Croix des Petits-Champs, Paris (Franc.). — 25. D. Merriifield, St-Austell, Parthpean (Angl.). — 26. H. Rosenthal, Keresztutcza 4, Kolozsvar (Hungar.). — 27. S. Kolowrat, Hotel Savoia, Alassio (Ital.). — 28. — F.-A. Vielhaber, Horn. N. O. (Aŭstr.). — 29. M. Kräutercraft, str. Lechno 50, loĝ. 8, Varsovio (Rus.). — 30. J. Thirion, 4, pl. St-Epire, Nancy (Franc.). — 31. K. Michelsen, 115 Gotersgadt, Kjopenhago (Dan.).

ANONCETOJ

Kosto. 20 centimoj (2 pencoj, 10 pfenigoj) por ĉiu linio.

Rabato de 25 % por 6 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtos enpresigi 3 liniojn unufoje senpage.

Oni sendu al ni la anoncetojn antaŭ la 5 kaj 20 de ĉiu monato, aldonante la monon. Poŝtmarkoj estas akceptataj. Oni skribu plej legeble.

Kromeriĉ (Moravio-Aŭstrujo). S-ro Adalberto Nemeĉ, poŝto restanta, interŝanĝos ĉiujn ilustritajn poŝtkartojn, kiujn li ricevos.

London (Anglujo). S-ro H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Road, deziras korespondi pri interŝanĝo aŭ aĉeto de malnovaj Esp. jurnaloj.

Le Coudray (par Chartres-Eure et Loir-Francujo). F-ino Hubert deziras korespondadi kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun fremdaj gesamideanoj.

Liestal (Svisujo). — S-ro Eduard Wenk p. adr. D-ro A. Veij Gysin, advokato deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Voiron (Francujo). — S-ro Barnier Etienne, boulevard de la République, Isère, tre deziras korespondi poŝtkarte kun ĉiuj gesamideanoj.

Le Coudray (par Chartres, Francujo). — F-ino H. Bay deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun francaj kaj fremdaj gesamideaninoj.

Rennes (Francujo). — S-ro & F-ino Jamin, 18, rue de Hoche, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun alilandanoj.

Douai (Francujo). — S-ro Philippe, 34, rue des Ecoles. La gesamideanoj aprobantaj la ideon pri Internacia kontraŭalkoholista Societo estas petataj skribi al mi. Mi ankaŭ kolektas poŝtmarkojn.

Wien (Aŭstrujo). — D-ro Fr. Priester, VIII, Trautsohngasse 1/7, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun alilanduloj.

Kroniko Esperantista

De kelka tempo kuradis tra la esperantistaro malprecizaj famoj pri « reformoj » kaj « plibonigoj » en nia lingvo. Kontraŭ tiuj malveraj famoj, Doktoro Zamenhof mem energie protestis en « La Revuo », per artikolo titolita « Pri reformoj en Esperanto »:

> En la lasta tempo, diras D-ro Zamenhof, inter la Esperantistoj kuris la famo, ke mi intencas reformi Esperanton. Tiu ĉi famo, kiu povas fariĝi tre danĝera, estas absolute malvera. Mi neniam intencis arbitre reformi la lingvon, ĉar tio ĉi ne sole estus pereiga por nia afero, sed mi havas por tio ĉi nenian moralan rajton ».

D-ro Zamenhof klarigas poste, ke Esperanto nun apartenas al la tuta mondo esperantista kaj ke li ne povas fari en ĝi eĉ plej malgrandan ŝanĝon precipe nun, post la Deklaracio, kiun li propravole donis en la Bulonja kongreso. La kaŭzo de la malĝusta famo pri « reformoj » estas projekto pri neologismoj (enkondukeblaj per vojo natura, sen ia rompado en la lingvo), kiun D-ro Zamenhof intencis prezenti al la Lingva komitato, sed kiun li forjetis, konstatinte, ke, pro la grandega malsameco de la opinioj, eĉ la plej senkulpa vojo de neologismoj, povus nin enmeti en tre grandan danĝeron.

> « Dudek jaroj de nia praktika laborado, li aldonas, montris, ke Esperanto tre bone taŭgas por ĉio, kion ni bezonas, kaj ke la vojo, kiun ni iras, estas bona; ni gardu do nin de ĉia tro frutempa deflankiĝo, antaŭ ol Esperanto atingis tute plenan venkon, ĉar per serĉado de plibono, pri kiu ni fantazias, ni povus facile perdi la bonon, kiun ni posedas. Nia ŝipo estas nun en la mezo de la maro! ĝi iras bone kaj ĝi naĝas bonorde al sia celo. Tial ni gardu nin fari kun ĝi iajn eksperimentojn kaj elvoki malpacon inter la ŝipanoj en la mezo de la maro! Ni atendu ĝis la ŝipo venos al la haveno! »

En la fino, li petas la reformemulojn, ke ili prezentu siajn proponojn al la Lingva Komitato, kies decidojn bonorde ekzamenitajn kaj leĝe voĉdonitajn, li ĉiam akceptos sen protesto.

Estus tre dezirinde ke la malmultaj reformamantoj fine komprenu tiujn saĝajn vortojn kaj ne perdu sian tempon per babilado, kiu haves tiun solan rezultaton malfaciligi nian propagandon ĉe la seriozaj kaj praktikaj homoj, kiuj ne lernos lingvon, ankoraŭ nepretan aŭ en ĝermo — eĉ se tiu ĝermo estus mirinda. Kiel bone konkludas artikolo de nia kunfrato « Lingvo Internacia »:

> « Unueco — ne perfekteco — estas la sola kondiĉo por la atingo de nia jam komenciĝanta venko; kaj « plibonigo », kiu rompus eĉ malmulte nian unuecon, estus por ni, pro tiu ĉi simpla fakto, danĝerega kaj prezentus rekte la malon de efektiva plibonigo ».

* * *

Kune kun la antaŭeniĝado de la printempo, la kursoj ĉesas kaj nian movadon kaptas la starado de la somero. Feliĉe, la kongreso Kembriĝa baldaŭ revokos la publikan atenton kaj rec signos novan antaŭenpuŝon. Cetere, por festi la finon de la esperantista jaro, organiziĝas multnombraj festoj, regionaj kongresetoj en Francujo, Hispanujo, Svisujo, Anglujo, k. t. p. La Germanaj Esperantistoj jus havis grandsukcesan kongreson en Dresdeno, ĉe kiu partoprenis kelkaj centoj da Germanaj samideanoj. La Braziloj ankaŭ nun havos sian nacian kongreson; el tiu ĉi lando, ni ricevis novan interesan jurnalon, nome « Brazila Revuo Esperantista », kiu enhavas kuraĝigajn novaĵojn pri nia propagando en tiu vastega lando, jam plugita de agemaj propagandistoj.

La ideo pri la IIa jubileo de Esperanto la 21an de julio trafis diversajn aprobojn. Tamen, oni en kelkaj landoj, (Belgujo kaj Anglujo) havas kelkan malfacilecon por festi la jubileon en dimanĉo. Tio, laŭ ni, estas tute ne grava. Se pro ia ajn cirkonstanco, ĉu nacia, ĉu loka, grupo ne povas organizi feston en la dimanĉo, tion ĝi tre bone povas fari antaŭ aŭ poste; sufiĉas, se la festoj okazas la saman semajnon. Jam multaj grupoj anoncis sian intencon organizi festeton por rememorigi tiun gravan okazon; aliaj sekvu! Tio estos aliparte bonega preparo por la kongreso.

* * *

Inter la laste aperintaj verkoj, ni citu broŝuron de S-ro Cefeĉ pri la « Elparolado de la vokaloj en Esperanto » Li opinias, ke nuanciĝo de la vokaloj en Esperanto estas necesa; tio estas apogata de multaj pruvaj ekzemploj. Tia elparolado estis ĝis nun uzata senkonscie de la plej multaj Esperantistoj, kaj la mallarĝaj reguloj pri konstante sama elparolo de la vokaloj estas en la praktiko ĉiutaga ne aplikeblaj. B. S. en Belga Sonorilo konkludas tiel pri tiu demando:

> « Oni forigis de l'Esperanta alfabeto la sonojn tro reciproke similajn, konfuzeblajn pro neĝusta elparolo. Ekzemple al la 5 esperantaj vokaloj oni povas doni elparolon, ĉu longan aŭ mallongan, ĉu fermatan aŭ ne, pli aŭ malpli sonan, akran, ne ŝanĝante la signifon de l'vortoj. La 5 vokaloj ĝuas, por sia elparolo, ian marĝenon aŭ interspacon de nedetermino, dank'al kiu la neevitebla diverseco de l'elparoloj enkondukas nenian dusencaĵon. Ni opinias, ke la tuta demando pri la elparolo de l'vokaloj en Esperanto, povas esti resumata je la ekzisto de tiu « marĝeno de nedetermino »; konsekvence, ne estas necese, en la ordinara instruado, diri ion alian, nek precipe, doni regulon rigidan, absolutan, tute neutilan, supoze ke oni ĝin obeus.. La natura elparolo, kun vokalsonoj pli aŭ malpli diversaj, la elparolo meza (ekfarita okaze de l'Bulonja kaj Geneva kongresoj) certiĝos okaze de ĉiu estonta kongreso, post kiu la kongresanoj mem ĝin propagandos ».

Tio ĉi, laŭ ni, bone kaj ĝuste esprimas tion, kio jam okazis kaj okazos en la praktiko; le genio mem de nia lingvo ne estas rigideco, sed fleksebleco kaj simpleco.

A. R.